

Tertuliano

Pasiono
de Perpetua kaj Feliçita

El la Latina tradukita de Gerrit Isai Berveling

Interrete:

La originala Latina teksto:

<http://www.thelatinlibrary.com/perp.html>

La Latina teksto kun Germana traduko:

[https://books.google.de/books?id=k1PoBQAAQBAJ&pg=PA10&lp=P
A10&dq=#v=onepage&q&f](https://books.google.de/books?id=k1PoBQAAQBAJ&pg=PA10&lp=P
A10&dq=#v=onepage&q&f)

Lastfoje kontrolitaj: 2020-05-02

Pasiono de Perpetua kaj Feliĉita

Passio Perpetuae et Felicitatis

En la monaĥejo Monte Cassino la prefekto de la Vatikana biblioteko Lucas Holstenius meze de l' 17a jarcento malkovris la Latinan tekston de l' Pasiono de Perpetua kaj Feliĉita (Passio Perpetuae et Felicitatis); la unua eldono aperis en 1663. En 1889 oni trovis Grekan version en Jerusalemo. Ankoraŭ ne estas tute certe, kiu estas la origina versio, kvankam la Latinan oni kutime pli favoras. Multaj fakuloj konsideras Tertulianon kiel la spiritan patron de la Pasiono en ĝia fina formo: la viziojn de la martiroj li do estus kuniginta kaj provizinta per enkonduko kaj postparolo. La tuto estas sufiĉe unika teksto.

Tempe de la okazaĵoj ĉi tie raportitaj Tertuliano troviĝis en Kartago. La martiroj devenis el Kartago aŭ el apuda urbeto Thuburbo minus. Ili estis kondamnitaj, kaj mortis la 7an de marto 203.

1 Se la praaj ekzemploj de la Fido, atestantaj pri la graco de Dio kaj edifantaj la homojn, ĝuste tiucele estis notitaj, ke ĉe ilia legado, kvazaŭ ĉe reprezentado de la okazaĵoj mem, Dio estu honorata kaj la homo fortigata; kial do ne same priskribi la novajn pruvojn, ja same konvenajn por ambaŭ celoj? Ĉar ankaŭ tiuj ĉi estos ja foje praaj kaj utilaj por postaj generacioj, kvankam en la nuno – ilia propra epoko – ili estas malpli ŝatataj, ĉar oni atribuas admirindecon precipe al malnovaĵoj.

Sed al ni ne gravas, se kelkaj malsame juĝas laŭepoke pri la virto de la sankta Spirito – kiu ja estas unusola –; male, la plejnovaĵoj estas konsiderendaj kiel plej gravaj, ĉar ili apartenas al la fina epoko, konforme al la graco-abundo destinita por la lasta epoko de la mondo: Ĉar en la lastaj tagoj, diras la Sinjoro, Mi elverŝos el mia Spirito sur ĉiun karnon, kaj iliaj filoj kaj filinoj profetos: ankaŭ sur miajn sklavojn kaj sklavinojn Mi elverŝos el mia Spirito: kaj junuloj havos viziojn kaj olduloj sonĝojn. Tial do ni, kiuj ne nur rekonas kaj honoras la profetaĵojn, sed ankaŭ la novajn viziojn kiel same promesitajn, kaj kiuj vidas en la ceteraj fortaĵoj de la sankta Spirito ankaŭ instruilojn por la eklezio (ĉar Ĝi ja estis sendita al ĝi por administri ĉiujn donacojn en ĉiuj homoj, konforme al tio, kiel la Sinjoro disdonas ilin al ĉiu unuopulo), – tial do ni ne povas ne noti kaj honori ilin, por glori Dion per ĉi legaĵo; por ke nek malforto nek senespero je l' fido igu kredinda, ke la graco de Dio troveblis nur inter la praaj generacioj, ĉu koncerne martirecon ĉu koncerne indecon je revelacioj: Dio ja daŭre restos efikanta tion, kion Li promesis – por atesto al la nekredantoj, por beno al la kredantoj.

Al vi, fratoj kaj fratinoj, ni do diskonigas, kion ni aŭdis kaj spertis: por ke vi, kiuj ĉeestis, rememoru la gloron de la Sinjoro, kaj vi, kiuj nun ĉi tion perceptas, per-orele sentu vin ligitaj al la sanktaj martiroj, kaj pere de ili al la Sinjoro Jesuo Kristo, al kiu apartenas gloro kaj honoro en la epokojn da epokoj. Amen.

2 Oni arestis kelkajn junulojn, kateĥumenojn: tio estis Revokato kaj ties kunsklavino Feliĉita, Saturnino kaj Sekundulo, kaj inter ili ankaŭ Vibia Perpetua, el nobela familio, alte edukita, matrone nuptita, kiu havis patron, patrinon kaj du fratojn, el kiuj unu same estis kateĥumeno, kaj virseksan bebon ŝi havis ĉebruste: mem ŝi estis ĉirkaŭ dudek du jarojn aĝa. Ekde ĉi tie ŝi mem rakontas la tutan historion de sia martireco, kiel propramane kaj proprasente verkitan ŝi postlasis ĝin.

3 Kiam – ŝi diras – ni ankoraŭ troviĝis inter niaj persekutantoj, kaj mia patro esperis apostatigi min per siaj vortoj kaj obstine pro sia amo provadis konvinki min: Patro, mi diris: ĉu – por doni ekzemplon – vi vidas tiun vazon aŭ kruĉeton, kiu kuŝas tie? Kaj li diris: Jes, ĝin mi vidas. Kaj mi diris al li: Ĉu ĝi povas nomiĝi per alia vorto, ol kio fakte ĝi estas?

Kaj li diris: Ne. – Tiel same do ankaŭ mi ne povas nomiĝi alia ol, kio mi estas: Kristana. – Skuite de tiu vorto, mia patro sin ĵetis al mi, por elŝiri miajn okulojn: sed nur iom li ĝenetis min. Li foriris, venkita, kune kun ĉi argumentoj de la diablo. La kelkajn tagojn, dum kiuj tiam mian patron mi ne vidis, mi dankis Dion, kaj sentis min pli bone pro lia malĉeesto.

En la daŭro de tiuj samaj kelkaj tagoj ni estis baptitaj: kaj la Spirito diktis al mi, ke nenion alian mi petu de la akvo krom suferon en mia karno.

Kelkajn tagojn poste ni estis akceptitaj en la karceron, kaj mi ektimis, ĉar tiajn mallumojn mi ankoraŭ neniam spertis. Ho kruela tago! Sufoka varmego pro la kunpuŝiĝo de tiom da homoj, premado de l' soldatoj; fine mi disŝiriĝis tie pro zorgoj pri mia infaneto.

Tiam Tercio kaj Pomponio, la benataj diakonoj, kiuj helpis al ni, efektivigis pere de pagado, ke kelkajn horojn ni povu resti en pli bona parto de la malliberejo, por refreŝiĝi. Elirinte el la karceron, ni ĉiuj okupiĝis pri niaj propraj zorgoj. Mi mamnutris la bebon, kiu jam malfortiĝis pro malsato. Zorgoplena mi parolis kun mia patrino, kaj la fraton mi kuraĝigis, la filon mi konfidis al ili.

Pro ĉagreno mi forvelkis, ĉar mi vidis ilin forvelki pro zorgoj pri mi. Tiajn zorgojn multtage mi suferis; kaj mi atingis, ke la bebo restu kun mi en la karceron. Tuj mi refortikiĝis, kaj mi senpeziĝis el miaj timo kaj ĉagreno pro la bebo. La karceron fariĝis al mi kvazaŭ palaco, tiel ke prefere tie mi estu ol aliloke.

4 Tiam mia frato diris al mi: Sinjorino fratino, vi estas jam tre estimata, tiel ke vi povus peti vizon, por ke estu montrate al vi, ĉu vi suferos aŭ estos liberigita.

Kaj mi, kiu sciis, ke konversacias mi kun la Sinjoro, kies grandegajn benojn mi sentis, plenkonfide mi promesis tion al la frato tiuvorte: Morgaŭ mi informos vin.

Vizion mi petis, kaj estis montrita al mi la jeno: Mi vidas gigantan bronzan ŝtupetaron, kiu atingas ĝis en la ĉielo, tiel mallarĝan, ke nur unuope oni povus suprengrimpi laŭ ĝi. Je ĝiaj flankoj estis fiksitaj ĉiuspecaj feraj iloj. Estis tie glavoj, lancoj, hokoj, ponardoj, pikiloj: se iu

senatente aŭ ne supren-rigardante provus ascendi la ŝtupetaron, tiu ricevus gravajn vundojn kaj lia karno kroĉiĝus al tiuj feraj iloj. Kaj sub la ŝtupetaro kuŝis terure granda drako, kiu minacis tiujn, kiuj intencis supreniri, kaj ĝi provis fortimigi ilin. Saturo ascendis antaŭ mi, Saturo kiu poste libervole transdonis sin mem pro ni, ĉar li ja edifis nin en la fido; je la momento, kiam oni arestis nin, hazarde li ne ĉeestis. Li atingis la supron de l' ŝtupetaro, turnis sin kaj diris al mi: Perpetua, mi vin atendas! Sed atentu, ke tiu drako ne mordu vin. Mi diris al li: Je la nomo de Kristo: ĝi ne nocos min.

Desub la ŝtupetaro, kvazaŭ timema pri mi, la besto malrapide eligis sian kapon; kaj kiam mi ŝajne ektretos la unuan ŝtupon, mi surpaŝis ĝian kapon. Kaj mi ascendis, kaj vidis senfine grandan ĝardenon, kaj meze de ĝi sidis viro grizhara, en vestaĵoj de paŝtisto, altstatura – li melkis ŝafojn. Ĉirkaŭis lin multaj miloj da homoj blanke vestitaj. Li levis la kapon, rigardis min kaj diris: Bone, ke vi venis, infano. Li vokis min kaj el la freŝa fromaĝo, kiun li ĵus preparis, li prezentis al mi ĉirkaŭ buŝplenon. Ambaŭmane mi akceptis ĝin kaj manĝis. Kaj ĉiuj ĉirkaŭstarantoj diris: Amen. Je la sono de tiu vorto mi vekiĝis, ankoraŭ maĉante ion dolĉan. Tuj tion mi rakontis al mia frato, kaj ni konkludis, ke efektiviĝos la pasiono; ni ne plu havis esperon ĉi-teran.

5 Post kelkaj tagoj cirkulis onidiro, ke oni prienketos nin. Ankaŭ mia patro venis al la urbo, ronĝate de indigniĝo. Li venis al mi por perturbi min kaj diris: Filino, kompatu miajn grizajn harojn: kompatu vian patron – se mi ankoraŭ meritas nomiĝi via patro – se per ĉi miaj manoj mi edukis vin al la nuna floranta junco – se mi amis vin pli ol ĉiujn viajn fratojn: ne hontigu min antaŭ ĉiuj homoj! Rigardu viajn fratojn: rigardu vian patrinon, vian onklinon: rigardu vian filon, kiu ne povos postvivi vin. For kun via fiero! Ne pereigu nin ĉiujn. Neniu el ni plu povos libere paroli, se al vi io okazos.

Tion li diris, kvazaŭ patro pro patra amo, kisante al mi la manojn, ĵetante sin antaŭ miajn piedojn. Enlarme li ne plu nomis min «filino», sed «sinjorino». Mi ĉagreniĝis pro la sorto de mia patro, ĉar li estis la sola en tuta mia familio, kiu ne havos ĝojon pro mia pasiono. Kaj mi kuraĝigis

lin: Sur tiu estrado tie okazos, kion volas Dio. Vi ja sciu, ke ni ne staras sub propra aŭtoritato, sed sub tiu de Dio.

Tute trista li foriris de mi.

6 Alian tagon, dum ni estis manĝantaj, subite oni forkondukis nin por pridemandado. Tuj disvastiĝis la diro tra la ĉirkaŭo de l' forumo, kaj kolektiĝis ega amaso. Ni suriris la estradon. La ceteraj estis pridemanditaj, kaj konfesis. Oni venis al mi. Aperis mia patro tuj kun mia fileto. Li tiris min de l' ŝtupo, petegante: Kompatu la infanon.

La prokuratoro Hilariano, kiu tiam anstataŭ la mortinta prokonsulo Minucio Timiniano posedis la rajton je mort-verdiktoj, diris: Indulgu la grizajn harojn de via patro, indulgu la junon de via ido. Plenumu la oferon al la bonfarto de l' imperiestroj. Mi respondis: Tion mi ne faros. Hilariano demandis: Ĉu vi estas kristanino? Mi respondis: Jes, kristanino mi estas. Kaj dum mia patro tie plu staris por provi forpuŝi min de tie, laŭ ordono de Hilariano oni forkondukis lin kaj batis per bastono. Mi ĉagreniĝis pro la sorto de mia patro, kvazaŭ mem batate: tiom mi ĉagreniĝis pro lia kompatinda maljuneco.

Tiam kontraŭ ni ĉiuj Hilariano eldiris la mort-verdikton. Li kondamnis nin al la sovaĝaj bestoj. Ĝojaj ni reiris en la karceron.

Ĉar mian bebon mi kutimis mamnutri kaj havi ĉe mi en la karcero, tuj la diakonon Pomponio mi forsendis al mia patro por peti la bebon. Sed mia patro rifuzis doni lin. Kaj, kiel decidis Dio: li ne plu bezonis mamnutradon kaj miaj mamoj ne inflamiĝis, tiel ke min ne suferigu zorgo pri la infano nek doloro de la mamoj.

7 Kelkajn tagojn pli poste, dum ni ĉiuj preĝadis, subite meze dumpreĝade sin aŭdigis mia voĉo – mi menciis Dinokraton. Mi estis mirfrapita, ĉar neniam ĝis tiam li estis en mia menso, kaj memorante pri li mi ĉagreniĝis. Kaj mi tuj komprenis, ke mi indas kaj ja eĉ devas preĝi por li. Kaj mi komencis insiste preĝadi por li, sopirante antaŭ Dio.

Tuj tiunokte jene estis montrite al mi: Mi vidas Dinokraton veni el ejo malluma, kie estis pluraj homoj: li ege ŝvitis kaj soifis, en vestaĵoj malpuraj kaj kun pala vizaĝo. Kaj sur lia vizaĝo ankoraŭ estis la sama

vundo, kiun li havis ĉe la morto. Tiu Dinokrato estis mia frateto sepjara, kiu pro kancero sur la vizaĝo suferis teruran morton, tiel ke pro lia morto hororis ĉiuj homoj. Por li mi do preĝadis. Inter li kaj mi estis granda distanco, tiel ke neniu el ni povis atingi la alian. Krome en la loko, kie estis Dinokrato, troviĝis baseno plena je akvo kun rando pli alta ol la staturo de l' knabo: kaj Dinokrato sin elstreĉis por trinki. Mi ĉagreniĝis, ĉar en la baseno ja estas akvo, sed pro la alteco de l' rando tamen li ne povos trinki.

Mi vekiĝis, kaj mi komprenis, ke mia frato fartas malbone. Sed mi konfidis, ke mi povos helpi al li en lia malbona stato: mi preĝadis por li ĉiutage, ĝis oni transportis nin al la soldata karcerero. Estis la intenco, ke ni batalos dum soldata gladiatorfesto okaze de la datreveno de Geto Cezaro. Tage kaj nokte mi preĝadis por li, lamente kaj sufere, por ke pro mi li estu pardonita.

8 La <unuan> tagon en tiu karcerero, estis montrite al mi: Mi vidas la saman ejon kiel antaŭe, kaj Dinokrato estas korpe purigita, bone vestita, refreŝigita. Kie estis la vundo, mi nun vidas cikatron, kaj la baseno, kiun antaŭe mi vidis, mallevis sian randon ĝis la umbiliko de l' knabo; kaj tiu nelacigeble ĉerpis akvon el ĝi, kaj sur la rando staris bovlo el oro, plena je akvo, kaj Dinokrato aliris kaj komencis trinki el ĝi; sed ĝi ne malpleniĝis. Satigite li foriris de la akvo, kaj ekludis, infan-maniere.

Mi vekiĝis. Tiam mi komprenis, ke li estas liberigita de sia puno.

9 Poste, kiam pasis kelkaj tagoj, Pudento, vic-oficanta soldato, estro de la karcerero, ekstraktis nin kun granda estimo, ĉar li komprenis, ke en ni estas granda virto. Li lasis multajn viziti nin, por ke ili kaj ni reciproke nin kuraĝigu. Sed kiam alproksimiĝis la tago de la ludo, envenas al mi mia patro, ĉagren-vundita, kaj li komencis elŝiri al si la barbon, sin ĵetis teren, ekkuŝis antaŭ mi kaj petis kompaton je sia aĝo, kaj li uzis tiajn vortojn, ke la tutan universon li kormovus. Mi ĉagreniĝis pro lia kompatinda maljuneco.

10 La tagon antaŭ ol ni devos batali, en vizio mi vidas: La diakono Pomponio venis al la pordo de la karcerero, kaj laŭte li frapas. Kaj mi eliris al li, kaj malfermis: li estis vestita en blanka tuniko sen zono, kaj portis

multkolorajn sandalojn. Li diris al mi: Perpetua, ni atendas vin: venu. Li prezentis al mi la manon, kaj ni ekiris tra sovaĝa tereno. Nur pene, fine, ni atingis la amfiteatron, senspiraj. Li kondukis min mezen en la arenon kaj diris al mi: Ne timu; tie ĉi mi estas kun vi, kaj mi kunbatalos kun vi. Kaj li jam estis for. Kaj mi rimarkas gigantan amason kiu streĉe atendas. Ĉar mi sciis, ke bestojn mi devos alfronti, mi miris, ke ili ankoraŭ ne estas senditaj kontraŭ mi. Sed [anstataŭe] eliris iu Egipto, aĉaspekta, akompanata de siaj helpantoj, kiu batalu kontraŭ mi. Al mi venas belegaj junuloj, kiel helpantoj kaj amikoj por mi. Mi estis senvestigita, kaj fariĝis vira. Miaj helpantoj komencis masaĝi min per oleo, kiel estas kutime por la agon; siaflanke la Egipton mi vidas ruliĝi en la polvo. Viro de tiel eksterordinara grandeco aperis, ke la supron de l' amfiteatro li eĉ superis: li havis festan tunikon sen zono, super subvestaĵo purpura, kiu iome videblis tra du rubandoj meze de la brusto; li portis multkolorajn sandalojn el oro kaj arĝento. Bastonon li tenis en la mano, kvazaŭ batalestro, kaj verdan branĉon kun oraj pomoj. Li postulis silenton, kaj diris: Tiu ĉi Egipto, se li venkos ŝin, mortigos ŝin per la glavo; sed se ŝi venkos, ŝi ricevos tiun ĉi branĉon. Kaj li retropaŝis. Ni ambaŭ antaŭeniris, kaj ni furioze ekbatalis. Li klopodis por kapti miajn piedojn, sed mi piedbatis lin en la vizaĝon. Li levis min en la aeron, kaj mi komencis tiel frapadi lin, kvazaŭ la grundon mi ne plu tuŝos. Sed kiam mi rimarkis, ke tiel nenion mi atingos, mi interligis la manojn, interplektante la fingrojn. Kaj mi ekkaptis lin ĉe la kapo, tiel ke li teren falis. Kaj mi piedpremis lian vizaĝon. Kaj la popolo komencis krii, kaj miaj simpatiantoj ekjubilis. Kaj mi iris al la batalestro, kaj ricevis la branĉon. Li kisis min, kaj diris al mi: Filino, pacon al vi! Glorokovrite mi direktiĝis al la pordo de l' graco, kaj mi vekiĝis. Kaj mi komprenis, ke ne kontraŭ bestoj mi batalos, sed kontraŭ la diablo. Sed mi ankaŭ certis, ke mia estas la venko.

Tion ĉi mi faris ĝis la tago antaŭ la ludo; pri la ludo mem iu alia skribu, se li volos.

11 Ankaŭ de la benata Saturo aperis vizio, kiun li mem skribis.

Li diras: Ni jam suferis, kaj ni forlasis la karnon, kaj kvar anĝeloj kunprenis nin orienten, sed iliaj manoj nin ne tuŝis. Ni ne iris en rekta

pozicio, kapon supren, sed kvazaŭ ascendante leĝeran deklivon. Liberigite el la unua mondo ni vidis senfinan lumon, kaj mi diris al Perpetua (ŝi ja estis je mia flanko): Jen tio estas, kion promesis al ni la Sinjoro: la promeso plenumiĝis. Kaj dum la kvar anĝeloj portis nin, malfermiĝis al ni ega spaco, simila je fruktoĝardeno, kun multe da rozoj kaj ĉiuspecaj floroj. La alteco de la arboj estis kiel tiu de cipresoj, kaj iliaj folioj senĉese teren falis. En la fruktoĝardeno estis kvar aliaj anĝeloj, pli brilaj ol la antaŭaj: kiam ili ekvidis nin, ili honoris nin, admire dirante al la aliaj anĝeloj: Jen ili! Jen ili! La kvar anĝeloj, kiuj nin portis, timiĝis, kaj starigis nin. Laŭ larĝa vojo ni piede pluiris unu stadion. Tie ni trovis Jokundon, Saturninon kaj Artaksion, kiuj dum ĉi sama persekutado estis vivaj bruligitaj. Ankaŭ Kvinton ni trovis, kiu same forlasis la karceron kiel martiro. Kaj ni demandis ilin, kie estas la ceteraj. La anĝeloj diris: Unue venu, eniru, kaj salutu la Sinjoron.

12 Kaj ni venis en lokon, kies muroj estis kvazaŭ faritaj el lumo; kaj antaŭ la pordo de tiu loko staris kvar anĝeloj, kiuj nin ĉe nia eniro vestis en blankaj vestaĵoj. Ni eniris, kaj ni aŭdis ke unuvoĉe ili diras senĉese: «Hagios, hagios, hagios». Kaj en tiu sama loko ni vidis iun sidi: kvazaŭ viro maljuna, kun neĝ-blanka hararo kaj vizaĝo juneca; liajn piedojn ni ne vidis, kaj dekstre kaj maldekstre de li estis po kvar olduloj; kaj malantaŭ ili staris ankoraŭ pli da olduloj.

Enirante kun granda admiro, ni haltis antaŭ la trono. La kvar anĝeloj nin levis. Ni kisis lin, kaj li karesis nin per sia mano. La aliaj olduloj diris: Ni staru. Kaj ni ekstaris, kaj interŝanĝis la pacon, kaj la olduloj diris al ni: Nun iru vi, kaj ludu. Kaj al Perpetua mi diris: Jen vi havas, kion vi deziris. Kaj ŝi diris al mi: Dankon al Dio, ĉar en la karno mi jam estis ĝoja, sed nun mi estas ankoraŭ pli ĝoja.

13 Ni eliris, kaj antaŭ la pordo ni vidis dekstre la episkopon Optato kaj maldekstre nian pliaĝulon, la katekiston Aspasio, disigitaj unu de la alia, kaj ambaŭ tristaj. Kaj ili sin ĵetis al ni antaŭ la piedojn, kaj diris: Repacigu nin reciproke, ĉar vi foriris el nia mondo kaj postlasis nin tiel.

Kaj ni diris al ili: Ĉu vi ne estas nia patro, kaj ĉu vi ne la pliaĝulo? Kial vi vin ĵetas al ni antaŭ la piedojn? Ni estis kortuŝitaj kaj brakumis ilin.

Perpetua ekparolis Greke kun ili; ni retiriĝis kun ili en la fruktoĝardenon, sub roz-arbuston.

Kaj dum ni parolis kun ili, la anĝeloj diris al ili: Permesu, ke ĉi tiuj refreŝiĝos, kaj se vi havas inter vi malkonkordojn, pardonu vin reciproke. Kaj ili konfuziĝis. Al Optato ili diris: Vi devas korekti vian popolon; ĉar ili kunvenas ĉe vi, kvazaŭ ili ĵus venus el la cirko, kverelante pri siaj partioj. Kaj ŝajnis al ni, kvazaŭ ili dezirus fermi la pordojn. Kaj ni ekrekonis tie multajn fratojn, precipe martirojn. Ni ĉiuj estis refortigitaj de nedirebla bonodoro, kiu nutris nin. Post tio kun ĝojo mi vekiĝis.

14 Tio estas la ĉefaj vizioj de tiuj plej feliĉaj martiroj Saturo kaj Perpetua, kiel ili mem surpaperigis ilin. Ne sen kompato Dio vokis al si pli frue ol la ceterajn, ankoraŭ dum la kaptiteco, Sekundulon, por ke li ne bezonu batali kontraŭ la sovaĝaj bestoj. Sed, se ne lia animo, certe lia korpo sentis la glavon.

15 Feliĉita, tamen, jenmaniere atingis la gracon de la Sinjoro: ĉar ŝi havis ventron jam okmonatan (ŝi jam estis graveda kiam oni arestis ŝin) kaj ĉar alproksimiĝis la tago de l' ludo, ŝi estis ege malgaja, ĉar ŝi timis, ke pro ŝia ventro oni prokrastos ŝian martiriĝon. Ja ne licas mortpuni gravedulinojn. Tiukaze ŝi poste verŝos sian senkulpan sangon meze de krimuloj kondamnitaj. Sed ankaŭ ŝiaj kunmartiroj ege afliktiĝis, timante ke tiel bonan kamaradinon, kvazaŭ solecan kompanon, survoje al unusama espero ili devos postlasi. Kuniĝinte en komuna ĝemado, ili do elverŝis preĝon al Dio, du tagojn antaŭ la ludo. Tuj postpreĝe ekiĝis la naskospasmoj.

Kaj kiam ĉe la naskado ŝi sentis doloron, ĉar okmonata nasko laŭnature estas malfacila, diris al ŝi unu el la servistoj de l' karceraj gardistoj: Se jam nun vi tiom suferas, kion do vi faros se oni vin ĵetos antaŭ la bestojn, kiujn vi malŝatis kiam vi rifuzis oferi? Ŝi respondis al li: Nun suferas mi, kion mi suferas, sed tiam estos en mi Alia, kiu suferos por mi, ĉar mi suferos por Li. Poste ŝi naskis filineton, kiun unu el la fratinoj edukis kvazaŭ propran filinon.

16 Ĉar la sankta Spirito ĉi tion permesis, kaj per sia permeso deziris ke la disvolviĝo de la ludo estu skribita, kvankam ne indaj por priskribi tian gloron, tamen ni tiel dire plenumos la ordonon de l' plej sankta Perpetua, kvazaŭ obeante al ŝia testamento, per aldono de dokumentado pri ŝia kuraĝo kaj la sublimeco de ŝia animo.

Kiam la tribunuso severege traktadis ilin, ĉar pro la instigaj kriadoj de l' stulta homamaso oni timis, ke ia magia sorĉado povus malaperigi ilin el la karcero, ŝi respondis al li en la vizaĝon: Kial vi ne permesas al ni, ke ni refreŝiĝu? Ni ja estas kaptitoj gravegaj, eĉ rekte de l' Cezaro: je lia naskiĝdato ni devos batali! Aŭ ĉu ne tuŝas vian honoron, ĉu tiutage oni aperigos nin bonfartajn?

La tribunuso ektimis kaj ruĝiĝis; kaj li ordonis, ke oni traktu ilin pli humane, tiel ke ŝiaj fratoj kaj ankaŭ la ceteraj povis viziti ilin, kaj ili sin reciproke kuraĝigis; ankaŭ la vic-oficanta soldato de la karcero fariĝis kredanto.

17 La antaŭtagon, uzante la lastan manĝon, kiun oni nomas mortomanĝo, laŭ sia eblo ne kiel mortomanĝon sed kiel agapon, ili samkuraĝe ĵetadis minacojn al la popolo pri la juĝo de Dio, atestante pri sia feliĉa pasiono, mokante la scivolemon de l' amasiĝanta publiko. Saturto diris: Ĉu la morgaŭo por vi ne estas sufiĉa? Kial libervole vi venas spekti tiujn, kiujn vi malamas? Hodiaŭ amikoj, morgaŭ malamikoj. Tamen, bonvolu bone noti niajn mienojn, por ke morgaŭ vi rekonu nin.

Ĉiuj de tie foriris kun ega miro; kaj multaj el ili fariĝis kredantoj.

18 Eklumis la tago de ilia venko, kaj el la karcero ili iris en la amfiteatron, kvazaŭ en la ĉielon, ĝojplenaj, kun serena vizaĝo kaj, se eble ili tremetis, estis pro feliĉo, ne pro timo. Sekvis Perpetua kun brilaj mienoj kaj senhastiga paŝado, kvazaŭ amatino de Dio, kaj per la forto de sia rigardo ŝi inklinigis ĉies okulojn. Ankaŭ Feliĉita kuniris, ĝoja ĉar ĉe la nasko la vivon ŝi savis, por ke nun la sovaĝajn bestojn ŝi batalu: iro de sango al sango, de akuŝistino al gladiatoro ret-batala, por post la nasko duabapte baniĝi. Alkondukite al la pordo, ili estis devigataj ŝanĝi vestaĵojn: la viroj vestitaj kiel pastroj de Saturno, la virinoj kiel pastrinoj de Ceresa. Sed Perpetua, plenfiera, ĝisfine rifuzis tion. Ŝi ja diris: Libervole ni venis ĉi

tien, por ke nia libero ne estu perfortita: nian vivon ni fordonas ĝuste por ne fari ion tian: tion ni interkonsentis kun vi! La maljusto rekonis ĉi justecon: la tribunuso permesis, ke ili estu enkondukitaj senplie tiaj, kiaj ili estis. Perpetua kantis psalmojn, ĉar ŝi jam estis surtretanta la kapon de l' Egipto. Revokato, Saturnino kaj Saturo eldiris minacojn al la spektanta publiko. Poste, kiam ili venis je vid-distanco al Hilariono, kun multa gestado ili diris al li: Nun vi punas nin, sed vin poste Dio! La publiko pro tio ekkoleris, kaj postulis, ke laŭvice ili estu batataj de la gladiatoroj, kiujn ili pasos. Ili mem sin reciproke gratulis, ĉar almenaŭ parte ili kunsuferas la pasionon de l' Sinjoro.

19 Sed kiu diris: Petu kaj vi ricevos, donis al ili laŭ ilia peto la vivofinon, kiun ĉiu deziris. Ĉar, vere, kiam foje ili parolis inter si pri la speco de martireco, kiun ĉiu deziris, Saturnino diris, ke por ricevi la plej gloran kronon li pretas alfronti ĉiujn bestospecojn. Dum la okazigo de l' spektaklo, efektive, li kaj Revokato unue spertis leopardon kaj poste, sur la estrado, ilin atakis urso. Sed Saturo abomenis nenion tiel forte kiel urson: li estis konvinkita, ke unusola mordo de leopardo mortigos lin. Kiam oni prezentis lin kiel predon al apro, anstataŭ li ĝuste la ĉasisto, kiu ligis lin por la apro, estis vundita de l' besto, kaj kelkajn tagojn post la ludo li mortis; Saturo mem estis nur iom kuntrenata. Kaj kiam surpodie oni ligis lin, por ke urso ataku lin tie, la urso rifuzis forlasi la kaĝon. Jen duafoje Saturo do estis revokita, sen ia vundo.

20 Sed por la knabinoj la diablo pretigis ekstreme danĝeran bovinon: ŝin kontraŭkutime oni aĉetis, por eĉ per la sekso de l' besto rivali kun ili. Nudigitaj, kaj volvitaj en retojn, ili estis kondukitaj en la arenon: tremskuiĝis la publiko, vidante ĉi junajn virinojn, el kiuj unu estis ege alloga, kaj al la alia, pro la ĵusa nasko, ankoraŭ lakte gutetis la mamoj. Oni do revokis ilin, kaj vestis ilin per tuniko. Unua Perpetua estis ekkaptita sur la kornojn; ŝi falis sur la lumbon. Kiam ŝi surteriĝis, la ŝiritan strion de l' tuniko ŝi tiris rekta por kovri la femurojn; ŝi pli atentis pri sia pudoro ol pri la doloro. Poste pinglon ŝi petis kaj kunigis la disependantajn harojn. Ja ne decas al martirino morti kun dispendantaj haroj; alie povus ŝajni, kvazaŭ ŝi lamentus en la momento de sia gloro. Tiel ŝi ekstaris, kaj iris al Feliĉita, kiu, kiel ŝi vidis, preskaŭ estis frakasita de la bovino. Ŝi donis al ŝi la manon kaj restarigis ŝin.

Ambaŭ denove nun staris. Post ĉi venko super la popola dureco ili estis revokitaj al la pordo de l' graco. Tie certa Rustiko, kiu estis kateĥumeno, akceptis ŝin kaj ne delasis de ŝia flanko. Kvazaŭ vekigante el sonĝo (ĉar tiel profunde ŝi estis en Spirito kaj ekstazo) ŝi komencis ĉirkaŭrigardi kaj je ĉies miro ŝi demandis: Kiam oni do antaŭĵetos nin al tiu bovino, aŭ kio ajn estu? Kiam ŝi informiĝis, ke tio jam okazis, ŝi ne pli frue tion kredis antaŭ ol ŝi konstatis certajn spurojn de mistraktado sur siaj korpo kaj vestaĵoj. Post tio sian fraton kaj la kateĥumenon ŝi venigis kaj diris al ili: Staru en la fido, kaj reciproke vin amu, kaj ne estu ŝokitaj pro nia pasiono.

21 Siaflanke Saturo kuraĝigis la soldaton Pudento, dirante: Unuvorte, kiel mi supozis kaj anoncis, ĝis nun mi sentis neniun beston. Nun do, ankaŭ vi kredu tutkore! Jen mi iras tien, kaj per unusola mordado de l' leopardo mi mortos. Kaj tuj, jam ĉe la fino de l' spektaklo, oni antaŭmetis lin al leopardo. Unumorde li tiom kovriĝis de la sango, ke la popolo kiam li turniĝis, laŭte atestis pri lia dua bapto: Bela bano, bela bano! Klare, ke estis savita, kiu tiel baniĝis. Tiam al la soldato Pudento li diris: Ĝis revido, restu memora pri la fido kaj pri mi! Ĉio ĉi ne konfuzu, sed fortigu vin!

Kaj samtempe li petis la ringon de lia fingro, mergis ĝin en sian vundon kaj redonis ĝin al li kvazaŭ heredaĵe, kiel garantiaĵon kaj memorigilon pri lia sango. Post tio, jam senkonscia, li teren falis apud la ceteraj por esti senkapigita je la kutima loko.

Tiam la popolo postulis, ke oni metu ilin en la mezon, por ke perokule ili ĉeestu la murdon, kiam la glavo tratranĉos iliajn korpojn. Libervole ili do releviĝis, kaj sin trenis tien, kie ĝin deziris la popolo, sed unue reciproke ili sin kisis por substreki sian martiriĝon per la kutima paco-kiso.

La ceteraj senmove kaj senvorte ricevis la mortigan baton, precipe Saturo: li kiu unua ascendis la ŝtuparon, unua transdonis la spiriton; ĉar [ĉe ties supro] li atendis Perpetuan. Sed ankaŭ Perpetua devis gustumi sian parton de la doloro: kiam ŝiaj ostoj estis tuŝitaj, ŝi ekŝrikis, kaj mem ŝi devis direkti al sia gorĝo la nestabilan manon de l' lernanto-gladiatoro. Eble tia virino, kiun timis la malpura spirito, ne estus povinta morti alimaniere, se ŝi mem ne konsentus.

Ho plej fortaj kaj plej feliĉaj martiroj! Ho vi, kiuj vere estas vokitaj kaj elektitaj al la gloro de nia Sinjoro Jesuo Kristo!

Kiu laŭdas kaj honoras kaj adoras ĉi tion, tiu ankaŭ devas legi ĉi tiujn ekzemplojn, kiuj ne malsuperas je la pasintepokaj ekzemploj, por edifo de la eklezio. Ankaŭ la novaj heroaĵoj tiamaniere atestu, ke la sankta Spirito, kiu ĉiam estas unusama, ĉiam ankoraŭ estas aktiva, same kiel la ĉiopova Dio Patro kaj ties filo Jesuo Kristo, nia Sinjoro, al kiu estu la gloro kaj senfina potenco en eternon. Amen.
